

EL LA SAĜO DE KOMENIO

el la verkaro de Komenio kompilis kaj tradukis Miroslav Malovec

KIEL SAĜE UZI LIBROJN, INSTRUMENTOJN DE KLERIGADO

Kiu deziras kleriĝi, devas estimi librojn pli ol oron kaj arĝenton.

Sed kiujn librojn legi? Mi konsilas, ke unue estu legataj libroj, kiuj okupiĝas pri la aferoj bezonataj por la vivo, kaj ne tiuj, kiuj nur elokventas.

Due, estu legataj libroj, kiuj prezentas ekzemplojn kaj ekzercojn pri la aferoj, ne tiuj, kiuj nur instruas mediti pri reguloj. La junaj kandidatoj de klereco estas kutime okupataj nur pri solaj preskriboj kaj reguloj. Kiam ili poste venas al realaj aferoj, ili restas mutaj aŭ balbutantaj. Ili ne kapablas kompreni efektive la aferojn, tiom malpli uzi ilin en la praktiko. Ĉi tiu radikikiĝinta eraro de lernejoj devas esti korektita kaj anstataŭ legado de multaj devas esti enkondukita legado de gravaj verkistoj.

Fine, necesas zorgi pri tio, ke ne estu disigitaj aŭtoroj malnovaj kaj novaj, ĝeneralaj kaj specialigitaj. La sciadon de la malnovaj oni devas estimi pro la antikveco, la sciadon de la junaj pro pli abunda lumo. La specialigita priskribo de aferoj devas esti lernata tial, ke ĝi klerigas tre demonstre, la ĝenerala priskribo tial, ke ĝi tre pliperfektigas la kapablon de konkludado kaj donas al ĝi unuecon kaj forton.

Sed ne sufiĉas librojn nur legi, ili devas esti legataj atenteme, kaj la plej gravaj lokoj devas esti substrekataj kaj eltirataj. Substreku en libro, kiu estas via havaĵo. Faru notojn aŭ skribajn eltiraĵojn, se la libro estas via aŭ de iu alia. Elektadi la plej utilajn aferojn estas tiom necese, ke havas nenian profiton el legado tiu, kiu faras por si neniajn skribajn eltiraĵojn. Nome, per notado la leganto alproprigas al si, kion li legis, kaj tio estas la sola certa frukto de legado. Klera vin faros ne libroj, sed studado de libroj. Elektadi el libroj nenion, signifas ĉion neglekti. Konfidi ĉion al sia memoro, signifas fari notojn sur vento.

Lipsius diras: Mi ne kolektas, sed elektas. Tiel li komprenigas, ke li ne eltiras laŭ hazardo, sed laŭ pripenso. Notu ĉion, kio estas por vi nova, ĝis nun nekonata, pri kio vi juĝas, ke ĝi estas bela kaj ke ĝi foje povas esti utila por vi, kaj ĝenerale ĉion, kion vi vidas brili kiel gemon. Kelkaj legantoj sekvas nur tion, kio koncernas ilian fakon, la ceterajn aferojn ili malatentas. Sed ni rekomendas ĝeneralan klerecon kaj konsilas, ke la leganto elektu kaj kolektu ĉion memorindan el ĉiu libro, kiun li prenas en la manojn.

La plej simpla maniero de elektado kaj kolektado estas uzi notlibron, en kiu vi regule notu, kion belan vi ĉiutage legis, aŭdis, vidis aŭ kian belan ideon vi mem kreis en la menso. Kiam pli poste vi trarigardos vian notlibron, vi konstatos kontente, kiom vi akiris ĉiutage. Sed memoru, ke tian notlibron necesas kompletigi per alfabeto registro, kiu montros al vi, kie la serĉata afero estas notita.

Nun mi venas al la utilo, kiun alportos al vi multjara laboro dediĉita al legado de aŭtoroj kaj al farado de skribaj eltiraĵoj. Vi riĉos per via propra, honeste akirita riĉaĵo. Se vi kolektos vian trezoron de abundaj notoj, vi kapablos dum unu tago trastudi sescent verkistojn kaj konsulti ilin. Vi akiros la kapablon prijuĝi la opiniojn de aŭtoroj kaj diri, kiuj estas pli veraj aŭ versimilaj ol aliaj. Kaj kiam ajn necesos, vi kapablos prelegi pri iu ajn afero eĉ tuttage.

ZORGO PRI INFANO

Ekzistas ekzemploj, ke homoj forkaptitaj en la infaneco de rabobestoj kaj inter ili edukitaj, sciis fari nenion pli ol sovaĝaj bestoj, eĉ per la lango, mano kaj piedo ne. Por fariĝi homo, la infano bezonas esti edukata de la homoj. La gepatroj devas ŝati la infanon pli ol arĝenton, oron, perlojn kaj gemojn kaj zorgi pri ĝi jam antaŭ ĝia naskiĝo.

Dum la gravedeco la patrinoj devas evitadi troan manĝadon, trinkadon aŭ male festadon,

ankaŭ falojn, fleksiĝojn, rapidajn ekstarojn aŭ mispaŝon, ĉar ĉio ĉi povas difekti ilian frukton, kiu estas estaĵo tre delikata. Ankaŭ kolerado, ekscitiĝado aŭ tristado estas tre malutilaj. Per subita ektimo povas la patrino eĉ mortigi aŭ grave difekti la feton.

Post kiam la infano naskiĝas, la gepatroj krom priflegado de la delikata korpeto per varmo kaj mola kuŝo, devas havigi al la infano ankaŭ taŭgan nutraĵon. Ĉiu patrino mem estu patrino, mamnutranta sian bebon per sia propra patrino lakto kaj ne fordonu ĝin al la zorgo de fremda virino. Tiu miskutimo de kelkaj damoj estas kontraŭ la naturo, ĉar aliaj animaloj tion neniam faras, ĝi malutilas al la infanoj, kiuj jam al kutimiĝis al la nutrado per la patrino sango, kaj la damoj, anstataŭ konservi sian belecon kaj sanon, forigas ilin de si, ĉar mamnutrataj infanoj estas kuracistoj de siaj patrinaj, elsuĉante kun la lakto ankaŭ diversajn malsanojn kaj malsanigajn malsekaĵojn. Patrino, kiu ŝatas pli multe dorloti hundon ol sian bebon, eĉ ne estas vera patrino.

Post kelka tempo eblas lernigi infanojn manĝi ankaŭ aliajn manĝojn, komence similajn al la lakto (molajn, dolĉajn, nutrajn), sed estas tre malutile al kutimigi ilin al medikamentoj. Tiaj homoj, dependigitaj jam de la infaneco al medikamentoj, neniam atingas perfektan forton, ili estas feblaj, malsanemaj, tusemaj, salivemaj, palaj kaj malgrasaj, ili kutime tro frue mortas. Tial, gepatroj, se vi estas prudentaj, gardu infanojn antaŭ kuraciloj kiel antaŭ venenoj, dum ili efektive estas nepre necesaj, simile evitu manĝojn varmegajn, spicitajn kaj tro salitajn, ankaŭ vinon, brandon ktp.

Ankaŭ alimaniere necesas gardi la sanon de la beboj. Ilia korpo estas delikata, la ostoj molaj, la vejnoj malfortikaj, ĉio ankoraŭ nematura. Prenante la infanon sur la brakojn, levante, balancante kaj remetante ĝin, singarde ĉion faru, por ke per mallerta klinado, ŝovado aŭ elfalo ne okazu rompiĝo de ia membro kaj pro tio kripliĝo, surdiĝo aŭ blindiĝo. La infano estas juvelo pli valora ol oro, sed pli fragila ol vitro.

Por la infano estas nepre necesa ĉiutaga moviĝado kaj korpa ekzercado. Ju pli la infano kuras kaj laboras, des pli ĝi dormas, digestas, kreskas kaj fortigas sian spiriton. Nur gardu infanojn kontraŭ vundoj kaj lezoj.

KIEL LA GEPATROJ PREPARU SIAJN INFANOJN POR LA LERNEJO

Ĉiu afero bezonas bonan preparon por esti plenumita utile. Kaj decas, ke la homo kiel estaĵo saĝa faru nenion senvole, sed ĉiam pripense kaj racie, ke li sciu, kion li faras, kaj kion li povas per tio kaŭzi. Ankaŭ la gepatroj devas ne fordoni la infanojn en la lernejon, kvazaŭ ili elĵetus ion el la domo, sed ili mem devas primediti, kio tie okazos, kaj klarigi tion al siaj infanoj.

Tre stulte agas tiuj gepatroj, kiuj ne doninte al la infano belan veston kondukas lin al la instruisto kiel bovidon al buĉisto, por ke la instruisto klopodu pri li laŭ sia kapablo. Kaj tute freneze kondukas tiuj, kiuj unue prezentas la instruiston kiel terurilon kaj la lernejon kiel torturejon, kaj nur poste venigas tien la infanon. Tio okazas tiam, kiam oni rakontas al la infanoj pri vipado, pri kolerego de instruistoj kaj pri malpermeso de ĉia ludado. "Mi sendos vin en la lernejon kaj tie vi malsovaĝiĝos, nur atendu!" diras kelkaj. Sed tia agado ne servas por kvietigi la infanon, male por teruri lin, por ke li en malespero sklave obeu la gepatrojn.

Prudentaj gepatroj agas jene:

Kiam la lernado proksimiĝas, necesas vekti en la infano ĝojon kvazaŭ por festeno. Diru, ke ĝi baldaŭ venos en la lernejon inter aliajn infanojn, ke ili komune lernos kaj ludos. La patro aŭ patrino povas promesi belan veston, belan ĉapelon, belan tabuleton aŭ belajn librojn. Se ili jam antaŭe aĉetis ilin, do montru ili, sed ankoraŭ ne donu.

Necesas ankaŭ klarigi, kiel bonega afero estas vizitadi lernejon kaj lerni. El kleraj homoj fariĝas majstroj, oficistoj, doktoroj, pastroj, urbestroj k.s., simple homoj raraj, gloraj, riĉaj kaj saĝaj, kiujn ĉiuj ceteraj estimas. Tial estas pli bone vizitadi lernejon ol marŝadi malantaŭ anseroj, porkoj aŭ plugilo, ol esti kampulo, paŝtisto aŭ malklera servisto. La lernado ne estas laboro, sed ludado kun libroj kaj plumo, ludado pli dolĉa ol sukero. Kaj por ke la infanoj kapablu imagi la ludadon, ne malutilas enmanigi al ili kreton kun tabulo, sur kiu ili povas desegni kaj streki, kion ili deziras kaj scias, liniojn, krucojn, cirklojn, stelojn, arbojn, ĉevalojn ktp. Ne gravas, ke la bildoj ne estos

rekoneblaj, ĉefe ke la etuloj havu plezuron kaj amuzon. Ne eblas, ke tio ne estus samtempe utila, ĉar tiamaniere ili ekzercas la manon kaj okulojn por pli facile skribi poste literojn. Pravigebla estas ĉio, kio vekas en la geknaboj emon por lernado kaj lernejo.

Plue la gepatroj devas vekti en la infanoj respekton kaj konfidon al la instruisto, laŭdante liajn sciojn kaj saĝecon, lian bonecon kaj afablecon; ke li estas eminenta homo, kiu multon scias kaj al la infanoj kondutas bone kaj milde. Estas ja vero, ke kelkajn knabojn li vipas, sed nur tiujn malobeemajn, spitemajn kaj friponajn, kiuj batadon meritas, dum la obeemajn kaj diligentajn li vipas neniam. Ĉiam li ĉion montras, kiel skribi kaj legi. Tiajn kaj similajn aferojn necesas diri por senigi la infanon de timo kaj angoro. Demandu etulon: "Diru, ĉu vi estos obeema?" Kaj se li respondos, ke jes, aldonu: "Nu, la instruisto estos sendube afabla al vi." Kaj por konatigi la infanon kun lia estonta instruisto, povas la patro aŭ patrino sendi al li ion per la infano, kaj la instruisto, konanta sian devon, parolos milde kun la infano, montras al ĝi ĝis nun neviditajn librojn, bildojn, muzikajn kaj matematikajn instrumentojn, simple ion, kio povus kapti la intereson de la etulo; li povas ankaŭ ion donaci, libreton, inkujon, moneron, sukeraĵon, frukton k.s. Por ke li ne havu perdon, la gepatroj povas kaj devas tion pagi aŭ anticipi sendi, ĉar ja temas pri profito de ilia ido. Tia maniero ebligas volonte, eĉ varme emigi la koron de la geknaboj por la lernejo, por lernado kaj por la instruisto; tio jam estos duona venko. La lernejo fariĝos nenio alia ol ludejo, kaj la infanoj prosperos ĝojige.

LA TUTA JUNULARO DE AMBAŬ SEKSOJ DEVAS ESTI KONFIDITA AL LERNEJO

En la lernejojn devas esti akceptataj ne sole la infanoj de homoj riĉaj kaj nobelaj, sed ĉiuj same, nobelaj kaj nenobelaj, riĉaj kaj malriĉaj, knaboj kaj knabinoj en ĉiuj urboj, urbetoj, vilaĝoj kaj kortoj. Ĉiuj homoj naskiĝis por esti homoj, por esti estaĵoj saĝaj. Krom tio ni ne scias, por kiu profesio taŭgas tiu aŭ alia infano.

Absolute ne gravas, se iu ŝajnas laŭnature sentalenta kaj stulta; tiu cirkonstanco rekomendas la ĝeneralan klerigon ankoraŭ pli multe kaj urĝas ĝin. Ju pli malrapidan kaj malican pensadon iu havas, des pli multe da helpo li bezonas por esti senigita de la animala malspriteco kaj rigideco. Ne eblas trovi homon tiel maltalentan, ke ĉia ajn klerigado alportus al li neniamajn plibonigojn; eĉ se la malsprituloj kaj stultuloj neniel prosperus en sciado, tamen eblas delikatiĝi iliajn morojn. Sed oni jam spertis, ke kelkaj homoj laŭnature malrapidaj akiris tian klerigon, ke ili superis ankaŭ homojn talentajn; verdire eldiris poeto vortojn: "Ĉion venkas persista laboro." (Vergilio). Ies spirito estas frutempe vigla, sed baldaŭ elĉerpiĝas kaj falas en apation; la spirito de alia homo estas komence malforta, sed pli poste vigliĝas kaj potence eminentas. Ne ekzistas sufiĉa kaŭzo, kial la alia sekso estu eliminata el la studado de saĝeco, negrave ĉu en la lingvo latina aŭ gepatra. La virinoj estas same dotitaj per vigla menso, kiu emas akcepti la saĝecon, ofte eĉ pli multe ol la sekso vira; ili same havas talenton por gravaj aferoj, por reĝado super la homoj, por donado de sanaj konsiloj al la reĝoj kaj princoj, por la medicino kaj por aliaj aferoj utilaj al la homaro. Kial ni allasu ilin al la alfabeto, sed poste forpelu ilin for de la libroj? Ĉu ni timas vanteman scivolemon? Sed ju pli okupata estas ilia menso, des malpli penetros en ĝin vantemo kaj scivolemo, kiuj estiĝas plej ofte pro spirita neokupiteco.

Kompreneble ne temas pri tio, ke estu donata en iliajn manojn ia ajn mikskolekto de libroj. Ni konsilas, ke la virinoj estu edukataj ne al scivolemo, sed al moralo kaj boneco, precipe en tio, kio decas por ili scii, ke ili ĝuste gvidu la mastrumadon, ke ĉiu virino kapablu levi bonstaton sian propran, la bonstaton de sia edzo kaj la bonstaton de siaj infanoj.

Se iu demandas: Kian utilon alportos, se metiistoj, portistoj kaj eĉ virinoj iĝos kleraj?, mi respondos: Ĝi alportos tiun utilon, ke ĉiu havos sufiĉe da materialo por meditado, sopirado, klopodado kaj agado, post kiam realiĝos ĉi tiu ĝenerala edukado de la junularo. Due, ĉiuj scios, per kio ili gvidu ĉian agadon kaj sopiradon de la vivo, inter kiuj limoj ili avancu, kaj per kia maniero ĉiu defendu sian postenon.

KVARGRADA LERNEJO LAŬ LA AĜO

Por la klerigado ni prenas la tutan tempon de junaĝo, de la infanaĝo ĝis la aĝo vira, nome ĝis la 24-a jaro, sed tiun tempon necesas dividi je certaj periodoj laŭ la naturo. La sperto montras, ke la homo kreskas korpe proksimume ĝis la 25-a jaro de aĝo, ne plu, sed poste li fortiĝas. Dum la bestoj atingas sian korpan grandecon en kelkaj monatoj aŭ maksimume en du jaroj, la homo posedas tiel malrapidan kreskadon certe tial, por ke li havu sufiĉe da tempo por prepari sin al la taskoj de la vivo.

La jarojn de la supreniĝanta aĝo ni dividos je kvar gradoj (infaneco, knabeco, adoleskanteco, juneco), donante al ĉiu grado ses jarojn kaj respondan lernejon:

1. infaneco - patrina lernejo (antaŭlernejo)
2. knabeco - elementa lernejo kun patrolingva instruado
3. adoleskanteco - latinlingva gimnazio
4. juneco - akademio kaj vojaĝoj

La lernejo patrina estu en ĉiu domo, lernejo elementa en ĉiu urbeto kaj vilaĝo, la gimnazio en ĉiu urbo kaj la akademio en ĉiu ŝtato aŭ granda provinco.

En tiuj lernejoj, kvankam diferencaj, ne devas esti prezentataj diferencaj aferoj, sed la samo per diferencaj manieroj laŭ la aĝo kaj laŭ la antaŭa preparo. La studobjektoj ne estos disigitaj unu de la alia, sed ili estos prezentataj ĉiam komune, same kiel arbo ĉiam kreskas samtempe en ĉiuj siaj partoj.

En la malsuperaj lernejoj ĉio estos instruata pli ĝenerale kaj en pli maldetalaj trajtoj, en la superaj lernejoj oni instruos pli specialige kaj pli detale.

En la patrina lernejo estos ekzercataj precipe la sencoj eksteraj, por ke la infanoj kutimiĝu manipuli objektojn kaj distingi ilin. En la patrolingva lernejo estos ekzercataj sencoj internaj, fantazio kaj memoro kun siaj plenumaj organoj, la mano kaj lango, nome per legado, skribado, desegnado, kantado, kalkulado, mezurado, pesado, parkerado ktp. En la gimnazio oni kulturos komprenadon kaj juĝadon de ĉiuj aferoj kaptitaj per la sencoj, kaj nome helpe de la dialektiko, gramatiko, retoriko kaj aliaj artoj kaj sciencoj. La akademioj kulturos precipe tion, kio apartenas en la sferon de la volo, nome sciencajn faktojn, kiuj instruas konservi la harmonion: la teologio harmonion de la spirito, la filozofio harmonion de la racio, la medicino harmonion de la korpo, la juro harmonion de la eksteraj agoj.

PATRINA LERNEJO (ANTAŬLERNEJO)

Ĉio, per kio oni volas provizi la homon, devas esti inokulata jam en ĉi tiu unua lernejo.

La t.n. METAFIZIKO metas sian komencon jam ĉi tie; al la infanoj ĉio prezentiga unue en ĝenerala kaj senorda konturo, kiam ili rimarkas, ke ĉio, kion ili vidas, aŭdas, gustumas kaj palpas, estas io, sed ili ankoraŭ ne distingas kio; nur pli poste ili subite ekdistingas tion. Do ili komencas kompreni la ĝeneralajn esprimojn: io, nenio; estas, ne estas; tiel, alie; kie, kiam; simila, malsimila ktp.

En la FIZIKO eblas gvidi la infanon dum ĉi tiu unua jarseso al tio, ke li sciu, kio estas akvo, tero, aero, fajro, pluvo, neĝo, frosto, ŝtono, fero, arbo, planto, birdo, fiŝo, bovo ktp. Kaj li bezonas ekkoni la nomojn kaj uzon de siaj korpopartoj, almenaŭ de la eksteraj. Tio lerniĝas tre facile en tiu aĝo kaj estas fundamento de la scioj pri la naturo.

La fundamenton de la OPTIKO lernas etulo, kiam ĝi komencas distingi kaj nomi lumon, mallumon kaj ombron kaj diferencojn inter la ĉefaj koloroj, la blanka, nigra, ruĝa ktp. La komenco de la ASTRONOMIO estas scii, kion oni nomas ĉielo, suno, lumo, stelo, kaj observi, kiel ili ĉiutage eliras kaj subiras.

La komencoj de la GEOGRAFIO formiĝas, kiam la infano lernas kompreni, kio estas mondo, valo, ebenaĵo, rivero, vilaĝo, kastelo kaj urbo.

La fundamentoj de la KRONOLOGIO metiĝas, kiam la infano komprenas, kion oni nomas horo, tago, semajno, jaro, somero, vintro ktp., kion signifas hieraŭ, antaŭhieraŭ, morgaŭ, postmorgaŭ ktp.

La komenco de la HISTORIO estas, kiam la etulo komencas rememori kaj rakonti, kio okazis antaŭ nelonge, kiel kondukis tiu aŭ alia homo en tiu aŭ alia situacio, kvankam nur infanmaniere.

La ARITMETIKO enigas siajn radikojn, kiam la infano komprenas, kio estas nomata iom kaj multe, kiam li scias kalkuli ĝis dek, kiam li rimarkas, ke tri estas pli multe ol du, kaj ke unu aldonita al tri faras kvar ktp.

Ili havos la fundamenton de la GEOMETRIO, se ili komprenos, kion oni nomas granda kaj malgranda, longa kaj mallonga, larĝa kaj mallarĝa, dika kaj maldika. Ankaŭ kion oni nomas linio, kruco, cirklo ktp., kaj se ili vidos mezuri ion per mezurilo.

Ankaŭ la fundamento de la STATIKO estos, kiam ili vidos, ke la aĵoj estas pesataj per pesilo, kaj kiam ili lernos pesi ion per propra mano por ekscii, kio estas peza kaj malpeza.

La komencojn de la MEKANIKAJ laboroj ili ekhavas, kiam oni permesos al ili, eĉ instigos ilin ĉiam ion entrepreni, t.e. transportadi objektojn tien kaj reen, ordigi ilin, konstrui kaj malkonstrui, ligi kaj malligi ktp., kiel ŝatas fari la geknaboj de tiu aĝo. Ĉar ĝi estas nenio alia ol eksperimentado de la natura talento, ni devas ne nur ne malhelpi, sed subteni kaj prudente direkti tion.

Ankaŭ la DIALEKTIKO, arto de meditado, malkaŝiĝas jam ĉi tie kaj montras siajn burĝonojn, kiam la infano vidas, ke la interparoloj okazas per demandoj kaj respondoj, kaj kiam ili kutimiĝas mem demandi kaj respondi. Necesas eduki ilin al demandado taŭga kaj al rekta respondado, por ke ili kutimiĝu memorteni certan temon, sen forkuradi de ĝi.

La infana GRAMATIKO prononcos korekte la gepatran lingvon, t.e. artikige elparolos sonojn, silabojn kaj vortojn.

La komenco de la RETORIKO estas imitado de la vortfiguroj, kiuj uziĝas en la hejma parolo, kaj de taŭga gestado kaj frazaccento."

La POETIKON ili gustumos, se ili lernos iom da versetoj, precipe edukajn. Se ili lernos kelkajn simplajn kantojn, ili ricevos enkondukon al la MUZIKO.

La unua komenco de la EKONOMIO estas memorteni la nomojn de la personoj, el kiuj konsistas la familio: patro, patrino, servisto ktp., kaj ankaŭ de la dompartoj: antaŭĉambro, kuirejo, dormoĉambro, stalo ktp., kaj nomojn de la mastrumiloj: tablo, plado, tranĉilo, balailo, kaj ankaŭ por kio ili estas uzataj.

La POLITIKON ili povas gustumi malmulte, ĉar la saĝeco de tiu aĝo ne atingas ekster la domon; tamen ankaŭ tio eblas, se ili rimarkos, ke kelkaj viroj kunvenas en la urbodomo, kaj estas nomataj urbestro, juĝisto, notario ktp.

Al ĉio ĉi taŭgas bildlibroj, en kiuj estas pentritaj montoj, valoj, arbo, birdo, ĉevalo, bovo, ŝafo, homo en diversaj aĝoj, ĉielo kun la suno, luno, steloj, nuboj, ĉefaj koloroj, potoj, pladoj, kruĉoj, martelo ktp.

Sed la plej fortikajn fundamentojn devas ricevi la instruo pri MOROJ (etiko), se ni volas, ke la moroj kunkreskiĝu kun bone edukita junularo. Ekzemple:

a) SOBRECO, kiam ili respektos bezonojn de la stomako kaj ne prenos pli da nutraĵoj ol necesas por kvietigi malsaton kaj soifon

b) PURECO en manĝado kaj vestoj, ankaŭ en pura konservado de pupoj kaj ludiloj

c) RESPEKTO al la estroj

d) ĉiam vigla kaj volonta OBEEMO ĉe ordonoj kaj malpermesoj

e) konscia VERDIREMO en ĉiuj vortoj; neniam permesu al ili mensogi kaj trompi, nek efektive nek ŝerce (ĉar ŝerco en malbona afero povas renversiĝi en gravan kulpon)

f) JUSTECON lernos tiuj, kiuj sen permeso de la posedanto nenion ektuŝas, ekprenas, tenas, kaŝas, kiuj al neniu malutilas nek envias

g) prefere ili estu kondukataj al AMO, ke ili volonte donacu el la sia, kiam ajn iu en malfacila situacio petas ilin, ja eĉ ke ili donacu laŭ propra iniciato

h) la infanoj devas esti kutimigataj al LABOROJ kaj al senĉesa okupo, serioza aŭ amuza, por ke ili ne sciu fari nenion

i) ili kutimiĝu ne babilaĉi kaj ne elbuŝigi ĉion ajn, kion la lango sentas, sed ankaŭ prudente SILENTI, kiam parolas aliaj, precipe respektinda persono, aŭ kiam temas pri io, kion decas prisilenti

j) kaj antaŭ ĉio ili devas esti gvidataj al PACIENCO, bezonata dum la tuta vivo, por ke la pasioj estu brideblaj pli frue ol ili ekfuriozos kaj enradikiĝos, por ke la infanoj konduku laŭ prudento, ne laŭ instinkto, por ke la koleron ili bridu ktp.

k) HELPEMO estas speciala ornamo de la juneco kaj de la tuta vivo, tial la geknaboj devos esti ekzercataj en ĝi, por ke ili ne forgesu alrapidi, kiam ili pensas, ke ili povas servi al la intereso de iu alia.

l) Al ĉio ĉi devas alpaŝi DELIKATECO de la moroj, por ke ili nenion faru ventkape kaj senprudente, sed ĉion kun deca modesteco. Al tio apartenas societa konduto, salutado, dankado je saluto, respektoplena petado, se ili ion bezonas, kaj deca dankado, se ili akceptis ian bonfaron ktp.

ELEMENTA LERNEJO

La tuta junularo devas esti unue konfidita al lernejoj, kie oni instruas per la lingvo gepatra. Kelkaj aŭtoroj male konsilas sendi al lernejoj kun patralingva instruado nur knabinojn, kaj el knaboj sole tiujn, kiuj en la estonteco dediĉos sin al metioj; sed la knaboj, kiuj laŭ decido de la gepatroj sopiras pri pli ampleksa kleriĝo, ne devas esti sendataj al lernejoj kun patralingva instruado, sed rekte al lernejoj latinlingvaj. Tamen niaj motivoj didaktikaj trudas al ni diferencon opinion.

Ni celas ĝeneralan klarecon de ĉiuj, kiuj naskiĝis kiel homoj, kaj ilian edukon al ĉio homa. Ili devas esti kondukataj komune sur la sama vojo, ĝis kie ili povas esti kondukataj komune, por ke ili ĉiuj reciproke sin esperigu, stimulu kaj spronu. Ni volas, ke ili ĉiuj estu edukataj al ĉiuj virtoj, ankaŭ al modesteco, solidareco kaj reciproka helpemo. Tial ili ne devas esti disigitaj unuj de la aliaj tiel frue, kaj ne devas kelkaj el ili ricevi okazon por admiri sin mem kaj por malrespekti aliajn. La deziro determini ĉirkaŭ la sesa jaro de aĝo, por kiu profesio kiu taŭgas, ĉu por la sciencoj aŭ por la metioj, estas miaopinie troa kaj nepripensita hastado; en tiu aĝo montriĝas ankoraŭ nek spiritaj kapabloj nek personaj inklinoj; ambaŭproprecoj vidiĝos nur pli poste. Simile ankaŭ en ĝardeno ni ne distingus ĉe junaj plantoj, kiujn necesas sarki kaj kiujn lasi, sed nur post ilia elkresko. Kaj ne sole la infanoj de riĉuloj, nobeloj kaj oficistoj naskiĝas kun talento, por ke nur por ili estu alirebla la latinlingva lernejo, kaj la ceteraj estu rifuzataj kvazaŭ sen espero. La vento blovas, kien ĝi blovas, kaj ne komencas blovi en certa tempo. Nia kvara motivo estas, ke nia ĝenerala metodo ne persekutas tiun solan, de ĉiuj tiom amatan nimfon, nome la latinan lingvon, sed ĝi serĉas vojojn por samkvalita tralaboro de la gepatraj lingvoj de ĉiuj nacioj, kaj tiu intenco ne devas esti detruata per arbitra transsaltado de la tuta patrolingvo.

Kvine, voli instrui al iu fremdan lingvon antaŭ ol li regas la lingvon gepatran, estas precize tiel, kvazaŭ oni volus instrui la filon sidi sur ĉevalo pli frue ol li scias paŝi. Kiel Cicerono diris, ke li ne povas instrui oratori tiun, kiu ne scias paroli, tiel nia metodo konfesas, ke ĝi ne scias lernigi la latinan al tiu, kiu ne scias paroli patralingve, ĉar ĝi starigis la gepatran lingvon kiel gvidanton sur la vojo al la latina.

Fine, ĉar ni serĉas edukon praktikan, la infanoj povas esti gvidataj al ĝi same facile per libroj verkitaj patralingve kaj prezentantaj la nomojn de objektoj. Se tio realiĝos, ili lernos latine pli facile, adaptante novajn nomojn al objektoj jam konataj.

La celo de la elementa lernejo estos, ke ĉiuj infanoj inter la sesa kaj dekdua jaroj de aĝo lernu ĉion, kion ili bezonos por la vivo, nome:

- lerte legi patralingve ĉion presitan aŭ manskribitan
- skribi komence legeble, poste rapide kaj fine korekte laŭ la patralingva gramatiko; la regulojn necesos prezentadi kiel eble plej kompreneble kaj laŭ ili enkonduki ekzercojn

- kalkuli skribe kaj parkere laŭ la bezono
- ĝuste mezuri diversmaniere longojn, larĝojn, distancojn ktp.
- kanti ĉiujn kutimajn popolkantojn; la pli talentaj lernantoj povas konatiĝi kun la fundamentoj de la figura muziko
- koni, kompreni kaj praktiki la moralon, prezentitan en reguloj kaj klarigitan per ekzemploj laŭ la komprenkapablo de certa aĝo
- ekscii pri la ekonomio kaj politiko tiom, kiom sufiĉus, por ke ili komprenu, kion ili ĉiutage vidas hejme kaj en la komunumo
- scii la ĉefajn trajtojn de la historio
- el la priskribo de la mondo lerni la ĉefajn aferojn: pri la firmamento, pri la globeco de la Tero, pri la oceanoj, maroj, riveroj, kontinentoj kaj pri la ĉefaj Eŭropaj ŝtatoj; kaj precipe koni la urbojn, montojn, riverojn kaj aliajn memorindaĵojn de sia patrujo
- fine ili sciu la ĉefajn aferojn pri profesioj, cion tute ĝenerale, por ke ili ne montru gravajn mankojn de sciado pri tio, kio okazas en la vivo ĉirkaŭ ili, kaj ankaŭ por ke poste montriĝu, al kio ĉiun puŝas lia natura inklinio.

GIMNAZIO

Por ĉi tiu lernejo ni starigas la celon, ke estu instruata la kompleta enciklopedio de artoj, nome ke el la gejunuloj, kiuj bonrezulte trapasos ĝin, estu:

- a) gramatikistoj, kiuj scias laŭbezone esprimi ĉiujn gramatikajn rilatojn
- b) dialektikistoj sciantaj bone difini, klasi, pruvi kaj refuti argumentojn
- c) retoroj kapablaj flue paroli pri ĉiu ajn temo
- d) aritmetikistoj kaj geometroj, unue por diversaj vivbezonoj, due tial, ĉar ĉi tiuj scioj speciale vekas kaj vigligas kapablon por aliaj aferoj
- e) praktikaj kaj teoriaj muzikistoj
- f) astronomoj, spertaj almenaŭ en la fundamentaj aferoj, nome en la scienco pri la movado de planedoj kaj pri kalkulado de kalendaro, ĉar sen tio restas blindaj la fiziko, geografio kaj grandparte ankaŭ la historio
- g) fizikistoj, kiuj konas la konsiston de la mondo, povon de la elementoj, diferencojn inter la animaloj, forton de plantoj kaj metaloj, konstruon de la homa korpo ktp., due kiel tiuj aĵoj kaj aferoj estas praktike uzablaj por nia vivo; tio samtempe elĉerpos parton de la medicino, terkulturo kaj de aliaj mekanikaj artoj
- h) geografoj, kiuj portas en la kapo la bildon de la tuta mondo, marojn, insulojn, riverojn, regnojn de nacioj ktp.
- i) historiistoj, kiuj scias nomi la plej gravajn ŝanĝiĝojn de la homaro, de la ĉefaj ŝtatoj, ankaŭ diversajn morojn, kutimojn kaj eventojn de nacioj
- j) etikistoj, kiuj kapablas precize distingi specojn kaj diferencojn de virtoj kaj malvirtoj; eskapi antaŭ la malvirtoj, teni sin ĉe la virtoj, same bone en ĝeneralaj nocioj kiel en speciala uzo, koncerne la vivon ekonomian, politikan, religian ktp.

Kiam la gejunuloj finos la sesjaran studadon, ni deziras, ke ili fariĝu ne perfektaj, ĉar la perfektecon malebligas ilia juna aĝo kaj malmultaj praktikaj spertoj, kaj ĉar ne eblas ekposedi la tutan oceanon da klereco dum ses jaroj, sed ke ili havu almenaŭ firmajn fundamentojn de sia estonta perfekta kleriĝo.

AKADEMIO

Al la akademioj oni prave konfidigas la finrealigon kaj kompletigon de ĉiuj sciencoj, samkiel ĉiujn superajn fakojn de instruado.

Tie estu farata studado ĝenerala, por ke restu nenio en la scienco nek en la homa saĝeco,

kion oni ne povus tie havigi al si. Estu uzataj pli facilaj kaj pli sekuraj metodoj, por ke ricevu solidan klerigon ĉiuj, kiuj tien alvenas. Per publikaj titoloj estu honorigataj sole tiuj, kiuj feliĉe atingis sian celon kaj estas indaj kaj kapablaj, ke oni konfidu al ili gvidadon de la homaj aferoj.

Por ke la akademia studado estu ĝenerala, oni bezonas unue profesorojn erudiciajn pri ĉiuj sciencoj, artoj, studoj kaj lingvoj, kiuj kapablu el si mem kvazaŭ el viva provizejo elektadi kaj komunikadi ĉion al ĉiuj, due elektitajn bibliotekojn de diversaj verkistoj, alireblajn al absolute ĉiuj.

La laboro de akademio iros pli facile kaj pli sukcese, se estos sendataj tien sole gejunuloj de pli granda talento, elito de la homaro, dum la ceteraj estos direktitaj al plugilo, al metioj aŭ al komerco, ĉiu laŭ sia natura talento. Due, se ĉiu dediĉos sin al tiu studado, al kiu destinis lin la naturo, kion eblas rimarki laŭ certaj indikoj. Simile kiel pro natura instinkto unuj fariĝas pli bonaj muzikistoj, poetoj, oratoroj, fizikistoj ktp. ol la aliaj, same estas unu pli kapabla ol alia por la teologio, medicino kaj juro. Tre ofte okazas eraro, ke oni, neglektante la naturan inklinon, ĵetas sin en studadon jen tian, jen alian, sed oni atingas nenion laŭdindan kaj ofte signifas multe pli en akcesora okupo ol en la propra profesio. Estus konsilinde aranĝi antaŭ la foriro de la gelernantoj el la gimnazio publikan ekzamenon pri talento kaj laŭ ĝi decidi, kiuj estu senditaj al la akademio kaj kiuj al alia profesio; kaj el tiuj, kiuj daŭrigos la studadon, elekti, kiuj studos juron, medicinon ktp. laŭ la natura inklinado kaj laŭ la bezono de la ŝtato. Necesos zorgi, ke la akademioj vivtenu sole diligentajn, honestajn kaj lertajn lernantojn kaj ne toleru pseŭdostudentojn, kiuj per pigrado kaj diboĉado disipas la havaĵon kaj tempon, prezentante al la ceteraj misgvidan ekzemplon.

Ĉe la akademio estu pritraktataj verkistoj de ĉiuj specoj. Sed por ke tio ne estu tro peniga kaj tamen utila, estus bone prepari ekstraktojn el la plej gravaj aŭtoroj. Tiuj, kiuj ne havas tempon studi ampleksajn librojn, tamen konus sufiĉe bone ĉiujn verkistojn. Kaj gustuminte multajn, ili povas pli detale dediĉi sin al tiuj, kiuj speciale vekis ilian intereson. Tia ekstrakto estas bona sinpreparo por legado de la kompleta verko, same kiel vojaĝanto pli perfekte utiligos sian vojaĝon, se li antaŭe studis mapojn kaj priskribojn de la pejzaĝo. Fine, la koncizaj ekstraktoj servos por rapida ripetado de verkistoj. La ekstraktoj povus esti eldonataj kaj en memstaraj libroj, kaj en la koncernaj libroj, por ke la leganto komence ricevu ĝeneralan imagon pri la verko.

Pri tio, kion la profesoro publike prelegis, estu al la studentoj rekomendataj la plej bonaj aŭtoroj, kiuj verkis pri la sama temo. Kaj kion la profesoro prelegis matene, pri tio li gvidu diskutadon posttagmeze antaŭ la tuta aŭskultantaro; la studentoj metu demandojn, se iu ion ne komprenis sufiĉe aŭ se io surprizis lin aŭ li trovis ĉe sia aŭtoro diferencon opinion, apogitan per motivitaj argumentoj, aŭ ion similan. Al ĉiu aŭskultanto estu permesite, sed laŭ certa ordo, respondi kaj al aliaj juĝi, ĉu la respondo estas sufiĉa; la profesoro kiel prezidanto rajtu decidi la polemikon. Tiamaniere tio, kion legis multaj, estu kunigata, ne sole por komuna profito, sed ankaŭ por pli perfekta enmemorigo, por ke estu akiritaj vere firmaj sukcesoj en la teorio kaj praktiko.

PRINCIPOJ DE INSTRUADO

1. La naturo respektas konvenan tempon. La ekzerciĝado de la homo devas komenciĝi en la printempo de la vivo, nome en la infanaĝo. La matenaj horoj estas la plej konvenaj kaj agrablaj por lernado. La tuta lernaĵo devas esti dividita laŭ la aĝo por ke nenio estu prezentata al lernado, kiam la komprenkapablo ankoraŭ ne sufiĉas.

2. La naturo preparas la materialon antaŭ ol ĝin formi. Necesas unue pretigi lernolibrojn kaj ĉiujn ceterajn instruilojn. Unue necesas kulturi la ekkonadon, nur poste la lingvon. Neniu lingvo estu instruata laŭ gramatiko, sed laŭ konvenaj verkistoj. Unue instruu pri objektoj kaj poste pri manipulado de ili. Unue prezentu ekzemplojn kaj nur poste regulojn.

3. La naturo prenas por sia laboro taŭgan objekton, aŭ almenaŭ taŭge ĝin adaptas. Transdoniton al lernejo oni instruu ĝis la fino. La instruisto devas unue prepari la menson de la lernantoj, nome veki ilian intereson kaj emon al lernado kaj sciado. Ĉiuj objektoj, kiuj distras la lernantojn kaj forkondukas ilian atenton, estu forigitaj.

4. La naturo ne miksas siajn laborojn, sed klasas ilin kaj plenumas ĉiun aparte. En la instruadon de la gramatiko ne enmiksiĝu la dialektiko, kaj kiam la spiriton fajlas la dialektiko, ne

interrompu ĝin la retoriko; kiam ni okupiĝas pri la latina, ne atendu nin la greka ktp., alie unu afero malhelpos la alian, kaj spirito okupata de multaj aferoj komprenos malmulton. En unu tempo la lernantoj traktu nur unu studobjekton.

5. La naturo komencas ĉiun sian agadon de interne. Unue estu formata komprenado de aferoj, poste la memoro, kaj fine la lango kun la mano. La instruisto devas atenti ĉiujn vortojn por malfermado de saĝeco kaj taŭge ilin uzi.

6. La naturo komencas ĉiun sian kreadon de la plej larĝa tutaĵo kaj finas per la plej etaj detaloj. Al la studentoj estu prezentataj fundamentoj de la universala klereco, tial ĉiam ŝajnos, ke la sekva studado alportas nenion novan, sed nur pli detale disvolvas la antaŭan. Ĉiu lingvo, scio aŭ lerteco estu unue prezentita per tute simplaj fundamentoj, por ke estu komprenita la totala bildo, due pli komplete per reguloj kaj ekzemploj, trie per kompletaj sistemoj kun aldonitaj malregulaĵoj, fine per komentarioj, se ili estas necesaj.

7. La naturo ne faras saltojn, sed iras antaŭen iom-post-iome. La studaĵo estu dividita je klasoj, por ke la antaŭa lernaĵo preparu kaj lumigu la vojon al la sekvanta. La tempo estu dividita tre zorge, por ke al ĉiu jaro, monato, tago kaj horo apartenu speciala tasko. La disdividiĝo de tempo estu plenumata precize, nenio estu ellasita nek ŝanĝita.

8. Kiam la naturo komencas ion, ĝi ne ĉesas, ĝis ĝi finas la laboron. Kiu estas konfidita al la lernejo, restu tie tiom longe, ĝis li iĝos homo klera kaj morala. La lernejo staru sur loko kvietaj kaj trankvila, for de ĉia bruado kaj ĝenado. Ĉiu preskribo estu plenumata sen interrompo. Evitado de lernejo kaj vagado de lernanto sub ĉia ajn preteksto estu permesata al neniuj.

9. La naturo zorge evitas kontraŭojn kaj malutilaĵojn. Ne donu al la lernantoj librojn krom tiuj, kiuj estas destinitaj por ili. La libroj estu tiel aranĝitaj, ke ili prave estu nomataj fontoj de saĝeco kaj moraleco. Ne permesu miskondutajn amikojn en lernejo nek ekster la lernejo.

METODO DE LINGVOJ

La lingvojn ni lernas ne kiel parton de klereco aŭ saĝeco, sed kiel instrumenton, per kiu eblas klarecon ĉerpi kaj komuniki al aliaj. Tial ni devas lerni ne ĉiujn lingvojn, kio ne eblas, nek multajn, kio estus senutila, ĉar tio forprenas tempon por studado de aferoj, sed sole la bezonatajn.

Lerni ilin ni devas ne ĝis plena perfekteco, sed nur laŭ la bezono.

La lingva studado devas iri paralele kun la studado de objektoj, precipe en la junaĝo, por ke ni lernu kompreni kaj esprimi en la sfero de lingvo nur tion, kion ni komprenas en la sfero de objektoj. El tio rezultas, ke ni ne lernu vortojn aparte, ĉar ankaŭ la objektoj ne ekzistas nek estas kompreneblaj izole, sed nur en sia interrilato. Due el tio rezultas, ke por neniuj estas necese koni la tutan lingvon kaj estus ridinde kaj naive, se iu provus tion. Trie rezultas, ke al la infanoj necesas klerigi la saĝon kaj parolon precipe per infanaj temoj, ĉion viran lasante por plenkreska aĝo. La lingvo kaj la intelekto devas esti fajlitaj iom-post-iome. La naturo ne faras saltojn kaj la arto ankaŭ ne, se ĝi imitas la naturon.

Ĉiun lingvon necesas lerni aparte. Unue la lingvon gepatran, poste tiun, kiu estos uzata apud ĝi. Al ĉiu lingvo devas esti determinita certa tempo. Ni ne rajtas fari el la flankaj laboroj laboron ĉefan kaj la tempon destinitan por praktika studado disipi per vortetoj. Ĉar la gepatra lingvo ligiĝas kun objektoj kaj aferoj, kiuj malfermiĝas antaŭ la intelekto malrapide, ĝi bezonas nepre pli multajn jarojn, proksimume ok aŭ dek, nome la tutan infanecon kaj parton de la knabeco. Nur poste eblas transiri al alia viva lingvo; ĉiu el ili povas sinsekve esti trastudita dum unu jaro; la studado de la latina povas esti finita en du jaroj, de la greka en unu jaro kaj de la hebrea en duonjaro.

Ĉiun lingvon oni devas lerni pli per praktikaj ekzercoj ol reguloj. Sed la praktika uzado devas esti subtenata kaj firmigata per reguloj. La lingvaj reguloj devas esti gramatikaj, ne filozofiaj. Ni ne devas esplori la esencon kaj originon de vortoj, frazoj kaj kunmetaĵoj, kial ili estas tiaj aŭ aliaj, sed per simpla maniero klarigi, kio kaj kiel okazas. La mezurilo por starigi regulojn de nova lingvo devas esti lingvo jam antaŭe konata, por ke eblu montri diferencojn inter ili. Estus ne nur senutile, sed rekte malutile ripeti aferojn komunajn (ekzemple difini, kio estas substantivo kaj kio verbo).

La unuaj ekzercoj de la nova lingvo devas manipuli per materialo jam konata, por ke ne estu

necese turni la atenton samtempe al la nekonataj objektoj kaj nekonataj vortoj; tio distrus kaj malfortigus la atenton. Oni devas paroli per novaj vortoj pri konataj aferoj, kio servos al pli rapida alproprigo de la vortoj.

Ĉiuj lingvoj estas lerneblaj laŭ unu sola metodo, nome per praktiko kun simplaj reguloj, montrantaj nur diferencojn kompare kun la lingvo jam konata kaj per ekzercoj de konataj aferoj. Sole la lingvon gepatran oni bezonas lerni preskaŭ perfekte. La patrolingva studado devas okazi gradon post grado: la infano parolu iel ajn, la knabo simple, la junulo orname kaj la viro efike.

PORDEGO DE LINGVOJ MALFERMITA

ENKONDUKO. Saluton, afabla leganto. Esti klera signifas koni la nomojn de objektoj. Se vi parkerigos ĉi tiun verketon fremdlingve, vi ricevos solidan fundamenton de la fremda lingvo kaj samtempe bazon por ĝenerala klereco. Komence ĉiu laboro ŝajnas peniga, sed se vi eklaboros, via spirito ĉion venkos.

SENVIVA NATURO. La steloj kvazaŭ lanternoj pendigitaj sur la firmamento prilumas la nokton kaj mezuras la tempon. La luno per sia kreskado kaj malkreskado determinas la monatojn. La suno per sia lumo limigas la tagojn. Fajrero povas kaŭzi fajron, kiu levas fumon disportanta fulgon; fine restas cindro. La akvaj vaporoj leviĝas supren, formas nubojn kaj refalas teren kiel nebulo, pluvo, neĝo aŭ hajlo. Pluvon ofte akompanas fulmotondro kun ventego. El fontoj elfluas torentoj, kiuj kolektiĝas kaj formas riverojn, enfluantajn en la maron. Senmova akvo formas lagon. Sur la supraĵo de la tero oni povas vidi montojn kaj valojn kun deklivoj, ebenaĵojn, ravinojn kaj grotojn. La rokoj disfalas je ŝtonoj kaj la ŝtonoj je sablo. Valoraj ŝtonoj estas diamanto, rubeno, safiro, marmoro kaj aliaj. La metalojn oni akiras el minejoj. La plej perfekta kaj pura estas la oro, al kiu proksimiĝas la arĝento. La malmolan feron atakas rusto, eĉ la harditan ŝtalon. Simile efikas verdigro je la kupro. La kupro kun la kobalto donas giseblan latunon. La plumbo estas pli mola ol la stano, sed nenio superas la hidrargon en strangeco: kvankam likva, ĝi estas ĉiam seka.

PLANTOJ. La arboj per radikoj suĉas akvon, alie ili velkas. El la trunko kreskas branĉoj. La folioj aŭtune falas. La fruktarboj donas pomojn, pirojn, figojn, olivojn. El vergoj de saliko oni plektas korbojn. El legomoj oni kulturas kukumon, brasikon, karoton, spinacon, cepon, ajlon, krenon, pizon, lenton kaj fazeolon. La greno (tritiko, sekalo, hordeo, aveno kaj maizo) alten levas la spikojn sur trunketoj. El spicoj uzas la kuirejo plej ofte pipron, zingibron, cinamon kaj mustardon. Boletoj estas la plej bongustaj fungoj. Sur arbedoj oni rikoltas ribojn kaj frambojn. Ĝardenojn ornamas rozoj, diantoj, tulipoj, violoj kaj aliaj floroj.

ANIMALOJ. La birdoj havas du piedojn, plumaron kaj bekon. Ili konstruas nestojn, metas ovojn, sidas sur ili kaj naskas idojn. Rabobirdoj kiel cirkuo, falko, aglo kaj akcipitro kaptas aliajn animalojn. Strigo, gufo kaj noktuo vidas nokte, sed tage ili ne vidas. Fazanojn kaj perdrikojn oni ĉasas por viando. Ansero gakas, kokino klukas, korvo grakas, pasero pepas. Papago scias imiti vortojn. Dombestoj helpas nin. Kreskinta ĉevalo ricevas hufoferojn kaj bridon; ĝi servas por rajdi aŭ treni. Ektiminte ĝi henas, baŭmas kaj kalcitras. Azeno iaas, bovo muĝas, ŝafo blekas, kapro mekas, porko gruntas. Hundo bojas kontraŭ fremdulo. La plej granda besto estas elefanto, kiu prenas furaĝon per la rostro. La vila urso murmuradas kaj grumblas. La leono terure muĝas. La tigo ĉiujn superas per sovaĝeco. La cervo estas lertmova, kvankam ĝi portas pezan kornaron. La vulpo printempe perdas multajn harojn. La leporo estas la plej timema; ĉe ĉiu susuro ĝi starigas la orelojn kaj kuras al vepro. La serpentoj rampas kaj demetas sian haŭton. Kuloj, puloj kaj iksodoj ĝenas nin suĉante nian sangon. La abeloj kolektas mielon. La formiko estas malgranda, sed laborema. La araneo plektas araneaĵon.

HOMO. La homo naskiĝas plorante. La akuŝistino vindas la bebon per vindotukoj kaj metas lin en lulilon. La vartistino prizorgas kaj mamnutras sian zorgaton. La infano ludas per ludiloj kaj lernas paŝi kaj paroli. Al adoleskanta knabo ŝanĝiĝas la voĉo. La ĵusaj plenkreskintoj estas junuloj. La vira aĝo kondukas al la kaduka aĝo kaj alportas faltojn kaj grizajn harojn. La maljunuloj estas

kutime sendentaj, fleksitaj kaj fariĝas duafoje infanoj. La homa korpo konsistas el ostoj, muskoloj, karno, nervoj kaj haŭto. La okulo bildigas objektojn starantajn antaŭ ĝi kiel spegulo. La palpebroj refreŝigas la okulojn per palpebrumado. La viran mentonon kovras barbo. La kruro konsistas el femuro, genuo, tibio kaj piedo. La brako havas kubuton kaj manon. Sur ĉiu mano kaj piedo ni havas kvin fingrojn kun ungoj, per kiuj ni skrapas aŭ pinĉas. La nutraĵo, forŝirita per la dentoj, iras tra la gorĝo en la stomakon. La koro en la brusto ekvivas kiel la unua kaj mortas kiel la lasta.

MALSANOJ. Laŭ aspekto ekzistas homoj dikaj kaj sveltaj, belaj kaj turpaj. Pli bone estas strabi ol blindi, misaŭdi ol surdi, balbuti ol muti. Kalvaĵo, lentugoj, verukoj kaj ĝibo malbeligas. Kripligo kaŭzas lamadon. Malplena stomako malsatas kaj soifas, troplenigita ruktas kaj abomenas manĝon. Malsanoj kaŭzas dolorojn. La dentoj doloras, kiam ili kreskas al etulo aŭ kiam putras la dentkarno. Malfermiĝinta ulcero eligas puson. Konvulsioj antaŭas apopleksion.

SENSOJ. Per palpado ni distingus, ĉu io estas seka aŭ humida, mola aŭ dura, glata aŭ raspa, peza aŭ leĝera. Per gustumado ni konstatas, kio estas dolĉa, amara, sala aŭ acida. La flaro perceptas odorojn, la aŭdo sonojn. Kontraŭaj sonoj estas rido kaj ploro, jubilado kaj ĝemado, kriado kaj flustrado, parolado kaj silentado. Per la vido oni dividas kolorojn je blankaj, nigraj, brunaj, bluaj, verdaj, ruĝaj kaj flavaj. En la cerbo sidas tri sensoj: la atento, kiu perceptas bildojn de ĉio vidita, aŭdita, flarita, palpita aŭ gustumita; la juĝado, kiu helpas kompreni diferencojn inter la objektoj kaj aferoj; la memoro, kiu konservas la akceptitajn kaj komprenitajn bildojn por estonta bezono.

METIOJ. La metioj donas manĝojn, vestojn kaj instrumentojn. La ĝardenisto per ŝpato fosas kaj per hakfosilo butas. La plugisto plugas kampon. La abelisto prizorgas abeluojn kaj forprenas mielon kaj vakson. La muelisto muelas grenon por ricevi farunon. La bakisto knedas paston kaj poste en forno bakas kukojn, bulkojn aŭ panon. La paŝtisto armita per vipo kaj bastono gardas ŝafojn kontraŭ lupojn. La buĉisto buĉas brutojn, stranĉas ilin kaj liveras al viandvendejoj viandon, grason, kolbasojn, anduojn kaj salamojn. La ĉasisto logas bestojn en kaptokavojn aŭ ĉasas ilin sekvante iliajn spurojn helpe de hundoj. La fiŝisto kaptas fiŝojn per reto aŭ fiŝhoko en lagoj kaj riveroj. La birdisto kaptas birdetojn per retoj aŭ per gluo kaj fermas ilin en kaĝojn. La kuiristo kuiras manĝojn en kaldronoj kaj kaseroloj. La vinisto elpremas el vinberoj sukon, kiu per fermentado fariĝas vino. La rajdisto sidas en selo aŭ staras en piedingoj, tenas la bridon kaj spronas la ĉevalon. La koĉero jungas ĉevalojn al la timono de veturilo. La navigisto sur ŝipo transportas varojn el la transmaraj landoj, la komercisto disvendas la varojn ne sen profito. La teksisto teksas ŝtofojn, kiujn la tajloro tajlas per tondilo kaj kudras el ili vestojn. La arbohakisto faligas arbojn kaj segas ilin, la lignaĵisto rabotas la lignon. La forĝisto formas per martelo feron moligatan en fajro, la seruristoj kaj horloĝistoj fajlas la feron. La potfaristo fabrikas el argilo potojn, kruĉojn, telerojn kaj pladojn.

DOMO. Ironte en frendan domon, rigardu unue la ŝildon, ĉu la adreso estas ĝusta, kaj nur poste frapu. Kiam oni malŝlosos la seruron kaj malfermos la pordon, eniru en la vestiblon kaj iru sur la ŝtuparo supren al la ĉambroj. La invititaj gastoj estas venigataj al manĝejo. Sur la tablo kun tablotuko kuŝas teleroj, manĝilaro, supujo kaj vinkruĉo. En la dormoĉambro staras lito kun kapkuseno kaj kusenego. En la banĉambro oni forlavas malpuraĵon el la korpo; ankaŭ la vestojn oni lavas per sapo. Por studado taŭgas ĉambro apartigita de bruado kaj provizita per skribotablo. Pri libroj zorgu bonege: havu ne multajn, sed elektitajn.

FAMILIO. Fraŭlo serĉas por si fianĉinon. Post la nupto ili estas geedzoj kaj loĝas kune. La patro naskigas, la patrino naskas infanon, sed ambaŭ lin prizorgas, amas, kisas kaj edukas. La gefiloj de la samaj gepatroj estas gefratoj. La geavoj amas siajn genepojn. La infanoj de geonkloj estas gekuzoj. Orfoj perdis siajn gepatrojn; la duongepatroj aŭ zorgantoj ne amas ilin tiom multe.

URBO. La urbon ĉirkaŭas murego, en kiu estas pordegoj. La stratoj estas pavimitaj per ŝtonoj. La antaŭurbo pligrandigas kaj la turoj beligas la urbon. Preĝejo, turhorloĝo kaj lernejoj pruvas bonan administradon. Gastejoj kun kuirejoj estas preparataj por alvenintoj. Flanke oni konstruas publikan necesejon. En la urbodomo kunsidas la administrantoj. Malantaŭ la juĝejo staras karcero. La krimuloj estas persekutataj kaj punataj.

LERNEJO. Sole kleraj homoj estas utilaj, tial necesas lernejoj. Skribu, kion la instruisto diras. Kion vi volas memori, legu ofte, laŭte kaj zorge. Kion vi komprenis, rakontu al alia. La

gramatiko instruas deklinacii kaj konjugacii, la dialektiko pensi kaj la retoriko elokvente paroli. En la aritmetiko oni adicias, subtrahas, dividas kaj multiplikas, en la geometrio oni mezuras. La muzikisto kantas aŭ ludas melodiojn. La geografo priskribas landojn. La historiisto rakontas eventojn, kiuj efektive okazis. La plej bona kuracisto estas la sobroco: ne manĝu kaj ne trinku, se vi ne malsatas kaj ne soifas. Kion ajn vi faras, unue diligente konsultiĝu, kiamaniere ĝin fari plej bone, kaj nur poste singarde ĝin faru. Arogantulo ĉien enmiksiĝas. Interparolante estu sincera sen ruzo, trompo aŭ flato. Ne interrompu parolanton. Se iu ofendis vin, preteratentu tion kaj pardonu; se vi mem ofendis iun, ne hontu peti pardonon. Serĉu saĝajn amikojn kaj evitu malicajn kaj miskondutajn kunulojn.

REBONIGO DE LA HOMAJ AFEROJ

Kutime oni ne rebonigas tion, kio ne estas difektita. Se ni rekomendas konsulton pri rebonigo de la homaj aferoj, ni supozas, ke ili estas difektitaj. Tio certe ne bezonas penigan pruvadon, ĉar estas ĝeneralaj la plendoj, ke nenio estas sur sia loko, ke ĉio devias de la ĝusta vojo. Ĉiuj homoj vidas, ke anstataŭ saĝeco regas malklereco aŭ sofistiko, anstataŭ politika reĝimo dominas anarkio aŭ konfuzo aŭ tiraneco. La mondo svarmas de senkleraj azenetoj, kiuj amas la tenebron de sia nesciado, kvankam aliflanke ne mankas la homoj de la mala ekstremo, kiuj estas tro scivolemaj, tro avidaj ĉion scii, kiuj tage nokte elĉerpiĝas per studado de aferoj senbezonaĵoj. La kutimaj homaj streboj estas klopodoj akiri havaĵon, rangojn kaj voluptojn. Multaj ne kontentiĝas per regado de si mem, sed ili deziregas regi la aliajn. Ili opinias plezuro, se ili povas aliajn mastri, batali kontraŭ ili, venki ilin kaj sklavigi ilin. La regantoj kutime tute ne meditas pri tio, kial ili regas. Ili pensas, ke nur por ili ekzistas la mondo, kaj ili traktas aliajn homojn kiel bestojn, misuzas ilin laŭ sia plaĉo, kaj ĉian reziston subpremas per forto, uzante vipojn, glavojn, katenojn kaj karcerojn.

Kiu volas konstrui domon, kolektas unue la konstrumaterialon kaj laboristojn, kiuj realigus liajn planojn. Simile ankaŭ por rebonigo de la homaj aferoj necesas laboristoj, kiuj kondukus la bone pripensitajn planojn al la dezirata realo. Por tia tasko taŭgus viroj elektitaj el la tuta mondo, inĝeniaj, lertaj, fidelaj al la ĝenerala bono, kiuj trapensus ĉiujn eblajn vojojn, manierojn kaj okazojn, kiel serĉi prosperon por ĉiuj, kiel la eltrovojn disvastigi kaj gardi kontraŭ difektoj. Ili estas bezonataj ekstreme multaj. Ne konvenas al unu sola homo, ke li plenumu laborojn universalajn, precipe se ili ne estas preparataj por unu nacio, sed por la tuta mondo, ne por unu jaro aŭ jarcento, sed ankaŭ por la tuta posteularo. Tial necesas asocio de tre multaj viroj, kiuj per fervoreco kaj senĉesa laboro klopodus prosperi al la homoj, dum ekzistos la homaro.

Kiel konate, se oni ne taskas konkretan personon, zorgas pri la afero aŭ neniu aŭ ĥaose ĉiuj. Tial estus utile, ke en ĉiu nacio estu komisiitaj salajrataj sciencistoj (almenaŭ po unu, se ne tutaj komitatoj), kiuj zorgus pri la ĝenerala klerigado. Necesas, ke ili formu ian asocion kaj elektu unu viron kiel prezidanton; ĉiuj membroj sendos skribe informojn al la prezidanto, kaj li poste al ĉiuj.

Ili zorgos, ke en ĉiuj nacioj, urboj kaj vilaĝoj estu fondataj lernejoj, kaj insistos pri tio ĉe la potenculoj. Plie ili zorgos, ke la lernejoj estu konservataj en bona stato, kaj ne permesos enŝteliĝon de malkutimoj kaj maldiligenteco. Krome, kiam hejme estos ĉio en ordo, ili pensos pri disvastigado de la lumo ankaŭ al najbaraj nacioj por elŝiri ilin el tenebro. Se ili renkontiĝos kun malfacilaĵoj, ili petos konsilon de aliaj membroj kaj dum du jaroj ricevos respondojn el la tuta mondo! Ĉiujare ĉiu membro devas sendi al la prezidanto raporton pri la stato de la publikaj aferoj en sia teritorio. Simile la prezidanto almenaŭ unufoje dum la jaro skribos al ĉiu membro kaj sciigos, kion memorindan li ricevis de la aliaj.

Kiam ni havos la veran universalan sciencon, aperos la vera lumo, kiu malkaŝos la principojn de ĉiuj aferoj, por ke restu nenio, kion ni ne konas kaj ne komprenas. Kiam ni havos ĝeneralajn lernejojn por ĉiuj homoj, la lumo disvastiĝos al ĉiuj. Kiam ni havos asocion de saĝuloj, ne estos ebla manko de la lumo kaj al la tenebro estos barita la vojo reen. Kiam ni havos universalan lingvon kaj kiam ĝi estos uzata de ĉiuj nacioj, la tuta mondo fariĝos trairebla por ĉiu loĝanto, tial ĉiu ajn povos laŭplaĉe kaj sen obstakloj vojaĝi tra ĉiuj teritorioj, instrui kaj lerni. Ĉar ĉiuj interkompreniĝos kvazaŭ unu gento, unu nacio, unu domo aŭ unu lernejo. Kiam ni forigos malamon

kaj ĝiajn kaŭzojn, ekestos en la tuta mondo ĝenerala paco, ĉar la homoj ne havos motivon por konflikti.

UNIVERSALA LINGVO

Granda obstaklo por konservado de la paco, por kulturado de la klerigaj klopodoj kaj por disvastigado de la vero estas la ĥaoso de lingvoj en la homa socio. Do neeviteble ankaŭ nun, kiam oni serĉas kaj esperas renovigon de la tuta mondo, estas necesa la helpo de lingvoj. Aŭ tiuj homoj, kiuj disdividos la lumon de saĝo, devos ellerni ĉiujn lingvojn, aŭ ĉiuj nacioj lernos unu komunan lingvon. Necesas preferi la duan vojon, ĉar sendube pli facilas, ke ĉiuj ellernu ion solan, ol ke unuopulo ellernu ĉion. Certe do kleraj homoj devas pripensi, kiamaniere starigi ian unusolan lingvon, kiun ili uzus en la reciproka rilato kaj kiun ili instruus al ĉiuj nacioj, eĉ al la plej malkleraj. Per ĝi ĉiuj komprenos sin reciproke pli bone, uzante la samajn vortojn, kaj kiu ajn volos, povos vojaĝi tra iuj ajn regionoj kaj mondopartoj kaj komprenos ĉiujn kaj estos de ĉiuj komprenata.

Se ne ekzistus alia eblo, estus konvene difini por tiu ĉi bezono prefere la latinan ol iun el la ceteraj lingvoj. Sed per universala lingvo oni devas helpi al ĉiuj egalrajte, dum per la latina lingvo ni helpus plej multe al ni mem, kiuj ĝin jam regas, ne ankaŭ al malkleraj nacioj, pri kiuj ni devas precipe pensi, ĉar ili prezentas la pli grandan parton de la mondo. Por ili estas la latina nekonata kaj malfacila. Ĝi postulas laborstreĉan multjaran zorgon kaj koncentritan diligentecon, kiel spertas tion nia junularo kaj kiel tion montras la konstruo mem de tiu ĉi lingvo, plena de diversaj kazoj ĉe substantivoj, tempoj kaj modoj ĉe verboj, konstruoj en sintakso kaj malregulaĵoj en ĉi tio. La latina estas malriĉa je kunmetaĵoj kaj ne tre fekunda rilate al derivaĵoj, tial ĝi pruntas tiom da vortoj de ekstere, precipe el la greka, de kiu ĝi plene dependas kaj sen kiu ĝi neniam atingas perfektecon. La homoj de pli fruaj tempoj ne estis sufiĉe precizaj observantoj de la aferoj por observi ĉiujn diferencojn kaj esprimi ilin per vortoj trafaj kaj konvenaj: ili kontentiĝis per esprimado de aferoj konataj kaj ordinaraj. Tre multajn vortojn ili uzis eĉ hazarde kaj senmotive; de tie originas abundo da homonimoj, sinonimoj, paronimoj, tropoj, figuroj, dusencaĵoj, superfluaĵoj kaj konfuzoj.

El tio rezultas la konkludo, ke kontraŭ tiuj multegaj obstakloj kaj konfuzoj de reciproka rilato ne ekzistas pli efika rimedo ol konstrui novan lingvon, kiu superos ĉiujn jam konatajn lingvojn, estante pli facila, por ke ni povu lerni ĝin sen perdoj tempaj kaj materiaj, pli belsona, por ke estu plezuro lerni kaj ellerni ĝin, pli perfekta, por ke ĝi utilu al komprenado de la aferoj mem. Ni sopiras lingvon plene racian, kiu enhavu nenion alian krom tio, kio servas por esprimi la sencon, analogan, kiu enhavus en nenio malregulaĵojn, kaj harmonian, kiu ne enportus inter aferojn kaj nociojn misproporciojn.

Se iu ekdubus, ĉu estas permesite krei novan lingvon, mi respondas, ke ĝi estas permesita. Se filozofoj, metiistoj kaj ĉiaj homoj rajtis ĝis nun krei nomojn por objektoj, kial ili ne rajtu krei ankaŭ verbojn, subjunkciojn kaj aliajn komponentojn, kiuj ankaŭ konsistigas la lingvon? Kaj se tiom da lingvoj estiĝis hazarde, konfuze, kial almenaŭ unu ne rajtus estiĝi laŭ racia plano kaj nobla renovigo? Kial ni lasu ĉion al hazardo? Kial konduki nenion sur la vojon de la racio? Kaj se estas permesite korektadi la nociojn laŭ la objektoj mem, kial ne estu permesite adapti la lingvon, por ke ĝi esprimu pli bone la korektitajn nociojn?

Necesas, ke la fondantoj de la nova lingvo sciu bone almenaŭ la ĉefajn lingvojn de la tuta mondo, ĉar en ĉiu ili trovos ion eksterordinaran por konstrui lingvon la plej belan kaj perfektan. La hebrea kaj la germana donos ekzemplon de riĉeco devenanta el arta vortkunmetado, la latina kun la slava montros sukcesan derivadon, la latina mem donos ekzemplon de bela prononco, la slava prezentos la ripetajn aspektojn ĉe verboj, la angla ligitecon de genro al la sekso ĉe substantivoj kaj la turka ne nur konjugacion, sed ankaŭ deklinacion ĉe verboj ktp. Miaopinie apenaŭ ekzistas lingvo, kiu neniel povus kontribui al la nova por donaci brilecon, riĉecon, facilecon kaj fortecon.

KELKAJ LINGVAJ PROPONOJ

Neutilajn vortojn ni forĵetu. Ho, kiom da neutilaj vortoj estas forĵetindaj! Ekzemple se en la latina eblas esprimi mankon de io per in- (indoctus, injustus, impius), kial tio ne okazas ĉie? Kial dua esprimo, surdus, caecus, claudus, turpis, se eblas diri inaudiens (neaŭdanto), invidens (nevidanto), inambulans (neiranto), impulcher (nebela) aŭ inauris, inoculus, impes?

Bazo de koncizeco estos, se ekzistos kiom eble plej malmultaj radikoj, ĉirkaŭ 200. Por objektoj plej ĝeneralaj, per kiuj eblas esprimi specialajn objektojn uzante diferencigan signon, proksimume 50 vortoj. Ne pli mi atendus da ĝeneralaj diferencoj (eksplikeblaj per adjektivoj). Agoj kaj statoj ne pli nombraj, nur la plej ĝeneralaj verboj. Adjektoj (esprimeblaj per prefiksoj) estos eĉ ne tiomaj; ili estos prenitaj el diferencoj inter loko kaj tempo. Se en ĉiu grupo estos kvindek da signifoj (aŭ proksimume tiom), estos 200 (aŭ tricent) vortradikoj de la lingvo, plejparte unusilabaj el unu, du aŭ tri literoj; ĉiuj ceteraj vortoj estos kunmetitaj, kompreneblaj per si mem kaj portantaj signifon, eĉ se ekzistus miloj da ili. Vortoj plursignifaj kaj sinonimoj ne estos tolerataj. Ni ne aliros specialajn objektojn, sed restos ĉe la ĝeneralaj kaj necesaj. Ĉiuj objektoj de la sama genro havos komunan genran nomon; la specoj, enhavataj en la genro, estu esprimataj per la sama nomo kun diferenciga signo (afikso). Tiel ekzemple oni povos unuecigi nomojn de astroj, plantoj, metaloj, ŝtonoj, arboj, animaloj, vestaĵoj, konstruaĵoj ktp. kaj en la nomoj regos admirinda klareco.

La imagoj pri la tempopartoj reciproke parencas, kial ankaŭ ne iliaj signoj (vortoj)? Kial tiom multe da ili diferencas laŭsone: tempo, momento, minuto, horo, tago, monato, jaro, jarcento, aĝo aŭ eterneco? Kaj simile: nun, ĵus, jam, tuj, antaŭ nelonge, hodiaŭ, hieraŭ, morgaŭ ktp.?

Kiom da aferoj, tiom da vortoj, nek pli, nek malpli, kaj ĉiu nova afero havu novan vorton. Diferenco en la afero havu diferencon en la vorto. Do neniu vorto povas esti dugenraj. Por simpla afero simpla vorto; por kunmetita afero kunmetita vorto. Substanca afero donu al la vorto karakteron de substanco (substantivo, verbo), kvalito la karakteron de aldono (adjektivo, adverbo), manko la karakteron de malhavo (finaĵo, afikso). Diferenca kazo de la sama nomo aŭ diferenca formo de la sama verbo havu diferencon finaĵon, ke nenio koincidu kun la alia aŭ kaŭzu konfuzon en la kunteksto. Principo: kio ajn havas alian signifon, havu alian formon.

Vortklasoj:

- substancoj - daŭraj (nomoj) - ĝeneralaj: mi, vi, iu
- komunaj: homo, urbo
- individuaj: Adamo, Romo
- variaj (verboj) - esti: albere (blanki)
- fari: albare (blankigi)
- suferi: albari (blankiĝi)
- akcesoraĵoj - adjektivoj
- adverboj
- mankoj kaj superfluo (finaĵoj de kazo, nombro, genro, tempo)
- kombinoj kaj kunmetoj (prepozicioj, konjunkcioj, subjunkcioj)
- hibridoj - participo (io inter nomo kaj verbo)
- interjekcio (io inter vorto kaj frazo)

Verboj havas diversajn formojn laŭ personoj kaj laŭ tempoj. Tio estas senutila. Kial lerni diversajn finaĵojn? Por indiki la personon, sufiĉas simple la pronomo. Ni prenu la radikon de la latina verbo esse - es; ni konjugacios simple tiel, ke ni antaŭ la radikon metos personan pronomon:

eges (mi estas) noses (ni estas)
tues (ci estas) voses (vi estas)
illes (li estas) illies (ili estas)

Simile superflua estas finaĵoj por preterito. Sufiĉas antaŭmeti signon de pasinteco ante (antaŭ):

anteges (mi estis) antnoses (ni estis)
anttues (ci estis) antvoses (vi estis)
antilles (li estis) antillies (ili estis)

Futuron oni kreas per signo de estonteco post (poste):

posteges (mi estos) postnoses (ni estos)

posttues (ci estos) postvoses (vi estos)
postilles (li estos) postillies (ili estos)

El ĉiu radiko eblas krei tri verbojn: netransitivan (subjektan), transitivan (aktivan) kaj pasivan. Ekzemple:

enso (mi estas) ensio (mi faras) ensior (mi estiĝas)
uno (mi estas unu) unio (mi unuigas) unior (mi unuiĝas)
vero (mi estas vera) verio (mi provas) verior (mi pruiĝas)
bono (mi bonas) bonio (mi bonigas) bonior (mi boniĝas)

A signifos ion vastan kaj grandan, I ion malgrandan kaj mallarĝan, O rondecon, klarecon kaj universalecon, U angulecon, neklarecon kaj neniomon, E estos karaktero meza inter granda kaj malgranda, inter ronda kaj anguleca, inter ĉiom kaj neniom, ĉie ĝi signifos iom aŭ parton de la tuto; H estas spiro, tial ĝi estos determinita por aferoj spiritaj; F estas rapida blovo, tial ĝi estos destinita por rapidaj movoj; L signifos molan, R malmolan, ankaŭ gasan, klaran, sonan, M aferojn nebulecajn, mutajn. Ĉu ne esprimi ankaŭ la pozicion, ke A signifu la plej altan, U la plej malaltan, I mezan?

Kio ajn estas sola (singulara), estu signata per vorto enhavanta unu vokalon, pluralo per duobligo de la sama vokalo aŭ (kio estas la samo) per streketo:

A - aa = á Jah (Dio) - Jáh (dioj)
E - ee = é Ben (filo) - bén (filoj)
I - ii = í Sir (sinjoro) - sír (sinjoroj)
O - oo = ó Dos (doto) - dós (dotoj)
U - uu = ú Mus (muso) - mús (musoj)

Neniu vorto havu longecon en la radiko, sed ĉe ripetado: io (mi estas) - ió (mi estas), bor (arbo) - bór (arbaro), tar (bovo) - tár (bovaro). Genro estu unu, nomata neŭtra; sed kie ekzistas sekso, la vira genro konservas la aferan finaĵon kaj la ina ricevos certan signon, ekzemple -a: tar (virbovo) - tara (bovino), io (mi estas viro) - ioa (mi estas virino). Tamen la verboj ne estu supersarĝataj per la genroj, tio servas por nenio. Pluralo estu esprimata per -n, ekzemple: o (mi) - on (ni), e (ci) - en (vi), i (li) - in (ili).

Deklinacio estos tre simpla. La kazoj estu kvin: nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, instrumentalo. Vokativo ne estas bezona, sufiĉas la nominativo. La deklinaciajn finaĵojn formas la vokaloj i, e, a, o. Estos do jena deklinacio:

mi: o oi oe oa oo ni: on oni one ona ono
ci: e ei ee ea eo vi: en eni ene ena eno
li: i ii ie ia io ili: in ini ine ina ino

Konforme al la pronomoj estos deklinaciataj ĉiuj nomoj. Ekzemple se "el" signifus "dio", kaj "ela" signifus "diino", ilia deklinacio estus jena:

el eli ele ela elo elon eloni elone elona elono
ela elai elae elaa elao elan elani elane elana elano

Konjugacio estu ĉe ĉiuj verboj sammaniera. Indikativo estu nura radiko kun signifo nedifina, t.e. prezenca, preterita kaj futura. Kaj kiel ni unuecigas vokativon kun nominativo, tiel ni unuecigu imperativon kun infinitivo, nur per aligo de pronomo: o, e, i; on, en, in. Se ekzemple I signifos esti, ni ricevos:

oi - mi estu oni - ni estu
ei - ci estu eni - vi estu
ii - li estu ini - ili estu

La tempoj estu nur tri, prezenco, preterito, futuro, sed en preterito kaj futuro du modoj,

nefinita (en stato de daŭro) kaj finita (en rezulto). La signo de prezenco estu nur la pronomoj:

io, ie, ii - mi estas, ci estas, li estas

ion, ien, iin - ni estas, vi estas, ili estas

La signo de preterito nefinita (imperfekta) estu prefikso h-:

hio, hie, hii; hion, hien, hiin

La signo de preterito finita (perfekta) estu prefikso heh-:

hehio, hehie, hehii; hehion, hehien, hehiin

Sed atentu! Ĉu ne estus pli bone preni kiel signojn de preteritoj kaj futuroj perfektaj kaj imperfektaj prepoziciojn aŭ adverbojn de tempo? Kiel en la latina: iam sum (mi jam estas), tum sum (tiam mi estas), post sum (poste mi estas). Se estos necesa la ripeta aspekto, oni komprenu ĝin laŭ longeco sur la lasta silabo:

io (mi estas) - ió (mi estas)

hiin (ili estis) - hiín (ili estis)

ien (vi estas) - ién (vi estas)

Antaŭ ĉio necesas elpensi tri bazajn verbojn (subjektan, aktivan, pasivan - esti, fari, iĝi), por ke ĉiuj ceteraj verboj povu esti formataj kaj konjugaciaj laŭ iliaj formoj, ekzemple:

I = esti o (mi estas) e (ci estas) i (li estas)

on (ni estas) en (vi estas) in (ili estas)

NI = fari no (mi faras) ne (ci faras) ni (li faras)

non (ni faras) nen (vi faras) nin (ili faras)

MNI = iĝi mno (mi iĝas) mne (ci iĝas) mni (li iĝas)

mnon (ni iĝas) mnen (vi iĝas) mnin (ili iĝas)

Laŭ ĉi tiuj tri oni kreos ĉiujn verbojn. Ekzemple el la interjekcio EN (jen!) ni ricevos jenajn verbojn:

eni - vidiĝi (jen esti)

enini - montri (fari jen esti)

eninimi - montriĝi (iĝi jen esti)

Ĉu ne eblus derivi de ĉi tie ankaŭ la verbon vidi? Ĉar vidiĝi, montri, montriĝi kaj vidi estas nocioj reciproke koneksaj. Sed kiamaniere? Tio tre kontribuas al la avantaĝoj, beleco kaj grava facileco de la lingvo. Ĉar la aliaj lingvoj ne konas ĉi tiun avantaĝon kaj konservis nur ĉe malgranda nombro da verboj (de tiuj tri signifoj) la saman radikon (ekzemple en la latina: albeo, albo, albes = mi blankas, mi blankigas, mi blankiĝas); plej ofte ili uzas diferencajn radikojn (pateo, appareo, video, ostendo = mi evidentas, mi aperas, mi vidas, mi montras).

Ĉe verboj estu la radiko ĉiam unusilaba, trilitera, el vokalo kun du konsonantoj. La vokaloj A, E, I, O, U diferencigu la signifon de la verbo subjekta disde la aktiva, pasiva, aktiva-aktiva kaj aktiva-pasiva. Se ekzemple ban signifus esti, ben signifus estigi, bin estiĝi, bon igi iun estigi, bun igi ion estigita.

La radiko mem ĉiam validu kiel infinitivo, kun prefiksa pronomo kiel imperativo, kun sufiksa pronomo kiel indikativo. La tempojn ni distingos per la prefikso F por futuro kaj P por preterito kun la vokalo de la koncerna verbo. Ekzemple:

Prezenco: bana, bane, bani; baná, bané, baní

Preterito: pabana, pabane, pabani; pabaná, pabané, pabaní

Futuro: fabana, fabane, fabani; fabaná, fabané, fabaní

Aŭ:

Prezenco: bena, bene, beni; bená, bené, bení

Preterito: pebena, pebene, pebeni; pebená, pebené, pebení

Futuro: febena, febene, febeni; febená, febené, febení

Jen, kian facilecon ni ricevas! Kaj tamen kian perfektecon kaj riĉecon! Konjugacio en tiu racia lingvo estos nur unumaniera, aŭ, pli precize dirite, nenia, estos nur tri pronomoj alifiksataj al la

verba radiko entenanta signon de estado, farado aŭ suferado, en estanteco, estinteco aŭ estonteco.

Enkonduko de prefiksoj grandigaj, malgrandigaj, disigaj, monstrigaj, duobligaj, grupigaj estus enorma avantaĝo por la lingvo! Ekzemple povas signifi

a disigon (kiel ĉe la grekoj)

e ioman mankon

i malgrandigon

u grandigon

o streĉon, troecon, universalecon

Imagu, ke "mel" signifas parolanto; poste "amel" estos mutulo, "emel" balbutanto, "imel" beboblekanto, komencanto en parolo, "umel" vokanto aŭ kianto, "omel" ĉion diranto, babilemulo ktp. Se "bar" signifus kie, poste "abar" estos nenie, "ebar" ie, "ibar" apenaŭ ie, "obar" ĉie ktp., ktp., ĉar o pro rondeco de sia signo kaj pro rondeco de la buŝo ĉe elparolo taŭgas por esprimi cirklon, t.e. universon.

Simile ĉe nomoj kaj verboj. Se "lus" signifas lumon, "alus" estos mallumo, "ilus" ombro, "ulus" granda brilo, "elus" iom da lumo, "olus" la tuta lumo, t.e. lumradiado, brilego. Se "lal" signifus paroli, estos "alal" silenti, "ilal" flustri, "ulal" voki, krei, "elal" ion paroli, rakonti, "olal" ĉion rakonti, babilaĉi.

Ho, kiom grandega ŝparado! Kiel grandega lumo de komprenebleco! Ĉar kiel radikoj de tiu lingvo servos nur literoj aŭ silaboj du aŭ triliteraĵoj (sed eĉ ne ĉiuj estos bezonataj!) laŭnombre ducent aŭ tricent; ĉiuj esprimos senpere la aferojn kaj manierojn de la aferoj. De ĉi tie ĝermos senlima kvanto da vortoj, sufiĉantaj por feliĉa esprimo de ĉiuj nocioj, eĉ en senfina kvanto.